



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia sendependa gazeto pri la esperanto-movado

1/decembro - '93

Propraj nomoj en la Fundamento de Esperanto

La *Fundamento de Esperanto* estas verko, pri kiu ĉiu Esperantisto, post la elementa stadio de la lernado, certe ion scias, kvankam malmultaj el tiuj lernantoj efektive studas la verkon.

Ĉiu bona instruanto iam atentigas lernantojn pri la sistemoj, uzataj en kaj la Plena Vortaro kaj en la Plena Ilustrita Vortaro, marki la radikojn kiuj apartenas al tiu Fundamento, kaj certe mencias la ne-tuŝeblecon de la verko en tuto. Ĉiuj rekonas la saĝecon de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de nia lingvo, en la averto: "Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!" Ni ĉiuj respektas la subtenan konsilon de Ak-ano Albault, ke "... La Fundamento estas dokumento, kiu fiksas precipe la strukturon kaj ĝeneralajn konturojn de la lingvo, ...". Ne estas surprizo, ke la fojoj provoj enkonduki ŝanĝojn neniam ricevas grandan subtenon.

Tiu *Fundamento* estas zorge elektita kolekto de tekstoj, prezentita al la Bulonja Kongreso, en 1905, far D-ro Zamenhof, kaj adoptita de tiu Kongreso dum laborkunsido. Ĝi restas ankoraŭ, sen iuj ŝanĝoj, por nia studado. La pli ol tri mil kvarcent radikoj de tiu verko fariĝis arkaikaj formoj, kaj por tiuj apartaj kazoj ni nun uzas aliajn formojn, sed tiu fakto neniel detruas la valoron de la verko.

La *Fundamento* esence estas la tuto de tri verkoj: la *Gramatiko*, en kvin lingvoj, de 1887; la *Universala Vortaro*, de 1893, kaj la *Ekzercaro*, de 1894, plus plurpaĝa *Antaŭparolo*, de 1905, ĉiuj verkitaj de Zamenhof mem.

El tiuj verkoj, la U.V. estas eble la plej interesa por ni, pro tio ke en ĝi estas, pli-malpli, la tuta stoko de ordinaraj, komunuzaj vortoj, uzataj ankoraŭ hodiaŭ. En tiu verko, oni ne trovas vere teknikajn, fakajn vortojn, krom tiuj, kiuj spegulas la vivkutimojn ĝeneralajn dum la lastaj jaroj de la dek-naŭa jarcento. Sed ni ja trovas la bazan stokon de substantivoj, adjektivoj, adverboj, ktp., komunaj en la ĉiutaga vivo.

Nur la radikoj aperas tie, sen finaĵo kiu montras la vortkategorion, kaj sen difino, sed kun ekvivalentaj vortoj en la kvin lingvoj, la franca, angla, germana, rusa kaj pola lingvoj.

Dum la jaroj, pluraj eminentaj verkistoj faris studojn tra la *Fundamento*, kaj raportis konkludojn, kun la celo, aŭ prilumigi dubajn punktojn aŭ erarajn formojn, aŭ plivastigi nian komprenon pri la strukturo de la lingvo. Inter la koncernaj studoj, tiu de Ak-ano Al-

bault, en la verko *Fundamento de Esperanto*, eldonita en 1963 far Esperantaj Francaj Eldonoj, estas la plej ampleksa.

Estas tiu verko, kiu venis al mia atento lastatempe, kiam mi volis esti informita pri landonomoj *Fundamentaj*.

La komenca ago por tiu mia studo estis fari liston de ĉiuj propraj nomoj, kaj tiu listo mem portis surprizojn al mi. La unua surprizo estis konstati, ke en la *Fundamento* la dek du monato-nomoj aperas kun majuskla inicialo, kaj do kiel propraj nomoj.

Tradicie nun, kaj verŝajne jam dum multaj jaroj, tiuj nomoj, simple kiel pri tago-nomoj, estas komunuzaj formoj, kiuj ne meritas majusklon. Sed la formoj *Fundamentaj* restas ankoraŭ en la U.V., sen la ŝanĝo. Ni do respektas la *Fundamenton*, sed permesas, ke aliaj formoj iom post iom enradikiĝu en nia lingvo. Kaj sekve, mi ne plu okupiĝas pri monato-nomoj en mia listigo de propraj nomoj.

Elsarkitaj ankaŭ estas pluraj kazoj de kvaŝaŭa duplikatado de nomoj, kiam unu formo estas derivaĵo de alia formo (ekzemplo estas Maria kaj Marinjo). La rezulto estas, ke el la pli ol sesdek propraj nomoj listigitaj nur 49 restas en mia fina listo.

La fina analizo, do, temas pri:

4 nomoj el la Antaŭparolo; 3 nomoj el la Gramatiko; 10 nomoj el la Universala Vortaro; kaj 32 nomoj el la Ekzercaro.

La sekva paŝo estis ordigi la nomojn en diversajn kategoriojn. Estis facila tasko elekti la kategoriojn, jene:

- a. Lingvo-nomo: Esperanto;
 - b. Kontinento-nomo: Eŭropo;
 - c. 5 landonomoj: Germanujo, Hispanujo, Izraelo, Rusujo, Turkujo;
 - ĉ. 6 urbonomoj: Berlino, Bulonjo, Londono, Nov-Jorko, Parizo, Varsovio;
 - d. 29 personaj nomoj: Aleksandro, Anno, Antono, Aŭgusto, Berto, Elizabeto, Emilio, Ernesto, Georgo, Henrieto, Johano, Jozefo, Kalvino, Klaro, Ludoviko, Lutero, Mario, Miĥaelo, Nikodemo, Paŭlo, Petro, Sofio, Ŝillero, Stefano, Teodoro, Vaŝington', Vilhelmo, Zamenhof;
 - e. 7 nomoj el religioj aŭ festoj: Aninciaco, Dio, Korano, Kristo, Mesio, Pasko, Pentekosto.
- Du el la 6 urbonomoj venas al ni el la Antaŭparolo, unu, (Bulonjo) pro la antaŭvidita prezento tie de la verko en tuto, kaj alia pro

tio, ke Zamenhof verkis la tekstojn en Varsovio.

El la 7 religiaj nomoj, kvin estas klare el Kristanismo, sed neniu klare el Judaismo, la religio de Zamenhof mem. Ni notu denove, tiun indikon de la volo de Zamenhof, ne trudu sian propran religion al Esperantistoj.

Aparte notinde estas, ke la nomo de nia lingvo, Esperanto, aperas en la *Fundamento* kiel propra nomo, sen ia ajn pretendo de alia ebla traktado. La lastatempaj provoj malaltigi la rangon de la nomo de nia lingvo al komunuza vorto, estas klare kontraŭ-

Fundamentaj.

Kaj la laste notinda punkto estas tio ĉi, ke en la *Fundamento* aperas

nur kvin landonomoj. El ili, la nomo Izraelo aludas al la antikva lando de la hebreoj, kaj ne al la nuna lando, por kiu ni uzas la formon Israelo. Restas, do, kvar nomoj kun la finaĵo -ujo; unu el ili aperas en la formo de klariga noto. Tio sciigas al ni, ke la *Fundamento* vere proponas nur tri nomojn en tiu formo. Pensu pri la granda bruo dum la jaroj, por provi devigi nin agnoski tian formon por multaj aliaj landoj, kaj por kondamni ĉiun alian formon. Mi pensas, ke nur pro tiuj kazoj, mia tempo kaj energio neniel estas perditajoj.

Lorens' Mi, Britio

Karaj legantoj,

Resendinte la abonilojn al 1994, multaj el vi gratulis, kaj demandis, kiel helpi nian agadon? Sincere ni dankas al ĉiuj, kiuj finance kontribuis al nia abonhelpa fonduso, aŭ al la *Fondaĵo Esperanto en Budapeŝto*:

- Császár Ernő, Hungario, 4000 HUF
- Christian Darbellay, Germanio, 46 DEM
- dr. Sághy Vilmos, Hungario, 500 HUF
- Dieter Rooke, Svisio, 53 CHF
- Gérard Fleuter, Francio 90 NLG
- Árpád Máthé, Budapest, 2000 HUF
- Mauro Tauzzi, Italio, 20 DEM
- dr. Palovits Gyuláné, Hungario, 3000 HUF
- Veli Hämäläinen, Finnlando, 59 NLG
- Horváth József, Hungario, 2000 HUF
- Szemők Balázs, Hungario, 1000 HUF.

La listo ne estas kompleta, en postaj numeroj ni daŭrigos ĝin.

Ni tre dankos ankaŭ vian ne-financan helpon, se vi varbos novan abonanton por *Eventoj*, ekz. dum la proksima Zamenhof-festo. De tio dependas la sorto de la gazeto...

Szilvási László



Movada teorio

Quo vadis, la movado?

10 jarojn antaŭe, en la jaro 1983, en Varsovio aperis libro el verkoj de la triopo Ryszard Kraško, Jerzy Leyk, Walter Zelazny, kun la titolo *Zamenhof - Movado - Doktrino*. Unu el la tri studoj, aperintaj en la volumo - *Sociologia karakterizo de la esperanto-movado* - estis verkita de Jerzy Leyk.

Estas inde ekkomenti la nociojn uzatajn de Leyk ankaŭ por bone sekvi la diskutojn sur paĝoj de *Eventoj*.

La aŭtoro en ĉi tiu studo kaj en artikoloj en la revuo *Pola Esperantisto* asertas, ke la **esperanto-movado** komence estis kaj parte ankaŭ nun estas unu el **reformismaj** movadoj. Por klarigi la aferon, oni povas diri jenon:

- Reformismaj movadoj estas **aktivadoj**
- kun komuna celo de homoj **el ne tre vasta rondo**, ne el la tuta socio;
 - aktivadoj **ne persekutataj** fizike;
 - aktivadoj **ne pri esenca organizado** de la koncerna socio;
 - kun aktivuloj (gvidantoj, ideologoj) liberaj, kun **rajto sin esprimi**.

Tipaj reformismaj movadoj laŭ Leyk pasas tra ses fazoj:

- Maltrankvilo, malkontento de apartaj, disaj homoj pro certa problemo, aferstato.
- Spontaneaj serĉado, konceptoj, vizitoj (de individuoj).
- Aperas konciso de komuneco de celoj; aperas gvidantoj.
- Formiĝas agadprogramo kaj institucioj.
- Oni utiligas tion (= organizajn formojn, asociojn, programon, ideologion) por atingi la celon.
- Kadukiĝas la asocioj (post atingo aŭ neatingo de la celo).

Leyk en la 80-aj jaroj opiniis, ke la esperanto-movado estas atinginta la 5-an fazon, kiu daŭras longe, kaj pri kies disvolviĝo oni povas havi diversajn hipotezojn.

Estas specialaĵo de la afero esperantista, ke ĝi produktas **komunumon**. Post la eksto kaj stabiliĝo de la komunumo oni povas supozi (aŭ pridubi) koncerne esperanton de **du sociaj fenomenoj**: a) la menciita **reformisma movado** (kun celo modifi ion en la

pli vasta socio); b) ekzistado de **komunumo** kun bezonoj kaj mekanismo sin konservi (laŭ ne deklarataj, sed funkciaj motivoj).

Se tribo konfesas, ekzemple, ke la triboj devenas de ora cervo, tio reprezentas ian mondkoncepton. Sed tio nepre helpas ankaŭ konservi la unuecon de la tribo. Simile, elementoj de la esperantistaj kulturo, simboloj, ideologioj ne nur kaj ofte ne tiom rolas kiel speciala maniero analizi iujn aferstatojn, sed ankaŭ kiel faktoroj integrantaj la komunumon.

Koncerne la evoluon de la **komunumo** (kaj do ne de la **reformisma movado** por internacia lingvo), Leyk opinias, ke la esperantistaro troviĝas en la dua (granda) fazo de sia evoluo. Inter 1887 kaj 1920 la esperantista komunumo **elformiĝis**; ekde 1920 (kaj ankaŭ en la verkperiodo) ĝi estas stabiliĝanta. (Subfazo ekzistas).

Faktorojn konservantajn la esperanto-komunumon Leyk metas en la sekvajn kategoriojn: a) integraj sloganoj; b) simboloj kaj kanzonoj; c) kongresoj, festivaloj; d) klubo vivo kaj korespondado; e) komunikiloj; f) organizoj. Konservanta faktoro estas ankaŭ la propra kultura tradicio.

Stabiligaj mekanismoj estas diverstempe diversaj:

- Ĝis proksimume 1905-07 laŭ Leyk inter la esperantistoj **regis ideocentrismo** (konvinko kaj agemo por reformi la sistemon de la internacia lingvo-komunikado).
- De 1907 ĝis post la dua mondmilito superregis **esperanto-centrismo**: ŝajnis gravaj la evoluo kaj la bono de de esperanto kaj ĝia komunumo.
- Post la dua mondmilito disvolviĝis **organizocentrismo**. La celo iĝas la esperanto-organizaĵo mem.

La sinsekvo en formo simpligita do estas: A) Ideo **reformi la internacian komunikadon** - B) Emo **flegi esperanton** - C) Emo flegi kaj konservi **organizaĵojn de esperanto**.

En la periodoj B kaj C la sociaj procezoj koncernantaj esperanton ne plu, pli precize **jam nur parte** estas karakterizeblaj kiel reformisma movado. Leyk skribas: "La mova-

do alprenis la formon **konservi kaj evoluigi la komunumon**, pli ol konsciigi la sociojn pri la motivoj, kiuj ĝin naskis... En la degenerita formo, la procezo konsciigi la celojn de la movado: reformi la internacian lingvan komunikadon alprenis en la e-komunumo formon de **deklara ekspansieco**".

Leyk do parolas pri ŝajna disvastigemo, pri agado, kiam oni ja parolas pri intenco disvastigi esperanton, sed efektive oni nur varbas unuopulojn, oni agitas lerni esperanton kaj aliĝi al la komunumo, agante efektive por konservado de la komunumo.

Post kiam la emon reformi komencis anstataŭi la emo flegi kaj konservi, aperis ĉe la komunumanoj **esperanto-komplekso**.

La esperanto-komplekso, asertas Leyk, "rezultas el la diverĝo inter la aspiroj de la komunumo (reformemo)". "La esperanto-komplekso alprenas ... tri ĉefajn formojn:

- prozeliteco, t.e. strebo "konverti aliajn... ofte agreseme, trude kaj aroge;
- kaŝo de sia kontakto kun esperanto...;
- eskapo de la ĝisnunaj priesperantaj interesiĝoj pro la perdo de iluzioj".

La esperanto-komplekson reciprokas malaprezo de la ekstera medio. La fonto de la malaprezo estas sama kiel tiu de la komplekso: la diferenco inter deklarata **ekspansieco, disvastigemo**, unuflanke, kaj praktikata **sinkonservemo**, aliflanke.

La esperantistaro vivas diaspore. Leyk laŭ modeloj de la sociologio - distingas tri nivelojn de la organizaĵo: 1) globa; 2) regiona (ekz., landa); 3) loka (ekz., urba). La evolumekanismoj laŭ tiuj niveloj diferencas.

Ĉiunivela oni havas populacian plafonon: nombrom super kiu (en certa etapo) la organizaĵo nepre ĉesas, ĉe kiu la komunumo en sia medio ne plu kapablas funkcii. Antaŭ atingo aŭ ne-atingo de tiu plafono oni transpasas du sojlojn: la ekzisto-sojlon (post kiu la kolektivo perspektive ekzistas) kaj stabiliĝo-sojlon (nombro post kiu la kolektivo havas ŝancon direkti sian agadon ankaŭ eksteren, sen la danĝero de malfortigo aŭ malorganiziĝo).

Blazio Vaha, Hungario

Organizaj demandoj

Vivu la kluboj

Ne pensu, ke eblas starigi esperantajn klubojn nur en grandaj urboj. Laŭ mi, se vi estas tri esperantistoj, vi jam povas aktivi kune. Tio ne postulas multan tempon kaj povas esti tre agrabla okupo por vi. Plej bona maniero varbi pri esperanto estas organizi ion, montri ke esperanto estas interesa kaj utila.

Komencu modeste, ne necesas havi klubojn. Simple kunvenu en ies salono ĉirkaŭ

trinkaĵo. Kune planu la jaron, nome kion vi volas organizi aŭ fari. Unu aktiveco monate estas jam sufiĉa. Ekzemple vi povas havi "temon" kiel paco, ekologio, sporto, ktp., kaj ĉiuj devas prepari ion. Gravas praktiki la lingvon parolante pri diversaj temoj por plibonigi vian parolkapablon.

Esploru, ĉu via loĝloko (urbo, vilaĝo) estas ĝemeligita kun alia loĝloko en la mondo. Ofte tiel estas, kaj tio estas tre bona ebleco kontakti la esperantistojn kiuj loĝas en la ĝemelloko. Se via loĝloko ne ĝemelas, tiam vi povas ĝemeliĝi kun triamonda klubo. Vi povas peti adreson de Hans Bakker ĉe UEA. Montrealo ĝemelas kun Lyono (Francio), Ŝanhajo (Ĉinio) kaj Moskvo (Rusio). Mia

celo estas fortigi la rilatojn inter tiuj urboj kaj ni. Multo eblas, kiel interŝanĝo de korespondadoj, eĉ kasedojn oni povas facile sendi kaj aŭskulti dum klubo vespero.

Fine, se vi volas plibonigi la mondon plie, mi invitas vian klubeton aliĝi al Amnestio Internacia. Tiam vi helpas al la liberigo de malliberuloj kiuj nenion malbonan faris kaj estas maljuste malliberigitaj. Tio kio gravas estas, ke via klubeto havu celon kaj komunan agadon. Se samtempe vi plibonigas la mondon, viaj agadoj estos des pli valoraj.

*Normando Fleury,
vicprezidanto de Kanada Esperanto-asocio
el "Lumo", vintro/1992*

Aranĝoj

Konversacia kurso semajnfina

Ĝi okazos 14 - 16.01.1994 je 25 km sudokcidente de Oslo en arbara kabano (skiebleco!). La kurso estos plene en esperanto, do, bonvenas eksterlandanoj (tamen oni nepre antaŭanoncu sin, ĉar la kvanto de lokoj estas limigita). Prezo - 400 norvegaj kronoj inkluzive manĝaĵon. La adreso de la organizantoj:

*Klubo Esperantista en Oslo,
Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, Norvegio.*


8-a BEL-seminario

Baha-a Esperanto-Ligo invitas al la seminario, kies temo estas *Praktika paca kunvivado*, kaj kiu okazos en la Kultura Centro Esperantista (Chaux-de-Fonds, Svisio) 12.-14.02.1994.

Okazos muzikado, ludoj, prelegoj, filmado, e-kurso por komencantoj ktp.

Informojn petu ĉe:

*Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds,
Svisio.*



Internacia Esperanto-Semajno

okazos en Tampere, Finnlando (la kongresurbo en 1995!) 27.06 - 01.07.1994. Kontaktpersono:

*Jukka Laaksonen, Uudenkylänkuja 2 B 11,
FIN-33530 Tampere, Finnlando.*

Sportaj kaj turismaj aranĝoj en Poprad

En 1994 Esperanto-Centro en Poprad, Slovakio, proponas la sekvajn sportajn kaj turismajn aranĝojn por esperantistoj:

Skisemajno (ebleco skii en Altaj Tatroj). 12 - 19.02.

Turisma semajno en Slovaka Paradizo - TUSE '94. 16 - 22.07.

Aŭtuna Subtatra Semajno - Altmontara turismo. 14 - 20.09.

Pliaj detaloj ĉe:

*Esperanto-Centro, Sobotské námestie,
CS-05801 Poprad, Slovakio;
tel. +42-92-32419.*

IJF-1994

La sekvajara IJF okazos inter la 30-a de marto kaj 5-a de aprilo en la montara restaĵo de Pracatinat, ĉ. 70 km-oj de Torino. La ĉeftemo estos: "Narkotaĵoj en la naŭdekaj jaroj". Pliaj detaloj en la postaj numeroj.

Interjuo

LKK-prezidanto de Seula UK: Han Moo-hyup

Demando. Estimata, longan tempon! Jam surbuŝigadas Seulo ankaŭ en Esperantio. Kiuj eventoj fakte en 1994 okazos en Koreio?


Respondo. Krom la 79-a UK, la duonjarcento de Internacia Junulara Kongreso, kaj la 13-a Komuna Seminario inter Korea kaj Japana Junularoj, kiu fame konatas en la orientazia e-movado. Ankaŭ la 29-a Konferenco de ILEI.

D. Koreio en la sekva jaro riĉos je grandskale internaciaj e-aranĝoj. Tio sendube estas turnopunktiga al la historio de nia movado, ĉu ne?

R. Kompreneble. UK ĝis nun okazis dufoje en la kontinento plej vasta en la mondo, Azio: en Tokio kaj Pekino. IJK nur unufoje en la orienta Azio: en Ootu. Okazigi ilin mem estas granda signifo, kaj esprimas progreson de la movado. Ankaŭ tio estas efika montrilo al la neesperantistaro.

D. Dum mia trijara restado en Eŭropo mi ofte renkontis tiujn, kiuj diris al mi volontan aliĝon aŭ deziregas salutumi. Tamen, la distanco troe foras por alia kontinentano. Kiom povas atingi la nombro de kongresanoj?

R. Ne ĉiam gravas la kvanto, sed ĝi foje pli



efikas al la manifestacio de la esperantistaro enmonde disloĝanta. Do, la LKK supozas ke la maksimuma nombro povos superi tri milojn, se venos kutimaj kongresemuloj el Eŭropo kaj pli multaj japanoj ol en eŭrope okazintaj UK-oj kaj aldoniĝos la nombro el Ĉinio kaj ceteraj landoj.

D. Kiel nun iras la preparado?

R. La LKK ĉiumonate kunsidas kaj kontrolas ĝisdatajn laborojn kaj pridiskutas la sekvajn farenaĵojn. Baldaŭ aperos la kongresaj afiŝoj kaj emblemo. Redaktatas aparte la nacilingva informilo pri la UK por ĉiu gazetredaktejo. Ni atendas la rezulton de nia peticio pri eldono de memora poŝtmarko al la ministro de komunikado. Ni baldaŭ invitos kapablan esperantiston eleŭropan gvidi lingvokursojn por la kongresa volontularo, kiu diversflanke servos al la kongresanoj. Ni daŭre tenas kunlaboran rilaton kun oficialaj instancoj. Do laŭplane iras la preparado. La LKK pleje klopodas ĝuigi la kongresanojn kaj sukcesigi UK-on, kiu ege malofte sursceniĝas en Azio.

D. Laŭ viaj vortoj valoras la slogano: "Ni rezervu someron por Seulo en 1994". La jaro estos nepreterlasebla okazo por ekkoni Landon de Kvieta Mateno kaj la kvinmiljaran historion, kulturon, popolon de ĝi kaj stampi en memoro nePIVajn vortojn - kimĉio, pulgogio, hanboko, makolio. Ĉu ne? Dankon pro viaj respondoj.

*Interjuis CHTS
el "La espero el Koreio", 1/1993*

Internacia Junulara Kongreso de TEJO

La datoj: 30.07 - 06.08.1994

La loko: Suda Koreio, Ch'Onan, Dan Kook Universitato.


La temo: Kia popolo, tia kulturo.

Oni havas siajn proprajn kutimojn, pensmanierojn kaj vivmanierojn, kiuj povas okazigi miskomprenojn. La kongresorganizantoj - Korea Esperanto-Junularo - deziras plian interkompreniĝon, proponante la kongrestemon.

La kotizoj varias de 280 ĝis 400 NLG depende de la aĝo kaj aliĝdato de partoprenontoj (ju pli fruaj ili estas, des malplialtas kotizoj); krome, reprezentantoj de afrikaj, latinamerikaj, orienteŭropaj kaj aziaj (krom Israelo, Koreio, Japanio, Malajzio, Singapuro, Tajvano, Honkongo) landoj havas 25-guldenan rabaton (TEJO-membroj - eĉ 60-guldenan); infanoj ĝis 13-jaraj ricevas duonan rabaton.

La aliĝilojn petu ĉe TEJO (Neuwe binneweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ ĉe la organizantoj:

*KEJ, CPO Kesto-7998,
Seul, 100-679, Koreio.*



EMBLEMO DE LA 50-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Korektoj

En Eventoj n-ro 40 aperis informo "Blumarkoj" propagandu esperanton!"

La aŭtoro de la markoj Henry D. Palmer atentigas,

ke ne li provizis per ilia stoko BEA-n, tion faris iu alia, nekona de li persone. La blumarkoj por la internacia uzo devas havi la francan surskribon "Par avion", krom e aldoneblas surskriboj en kiu(j) ajn lingvo(j).

En Eventoj n-ro 41, p.3, en artikolo pri "Komputada baza terminaro", la adreso Wolfram Diestel estis indikita ne ĝuste. La interesigantoj turnu sin al li laŭ la adreso: Bauvereinsstr. 3, D-04416 Markkleeberg, Germanio.

By air mail
Aerpoŝte
Par avion

Faka aplikado

Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj n-ro 3-4/1993

La nova, duobla (88-paĝa) numero de la plej ampleksa scienca periodaĵo en Esperanto ĉi-foje elstaras per tema varieco. Abundas la rubrikoj: "Altaj sciencoj kaj tekniko", "Sciencoj kaj socio", "Tribuno de scienco", "Scienca krestomatiaĵo"... - ĉiu kun interesaj, ofte ampleksaj artikoloj pri robotoj, mikro-laseroj, artefarita intelekto, elektronikaj retoj, interlingvistika modeligo kaj aŭtomata tradukado, bioritmoj, ktp.



Ne mankas en la numero reprezentoj el e-periodaĵoj kaj apartaj eldonoj, kun tre serioza elekto. La plej grava estas represo en la rubriko "Monda ekonomio" de la teksto de "Mallonga enkonduko en la socialan merkatekonomion", antaŭe eldonita broŝurforme en Leipzig (vd. *Eventoj* n-ro 42). Ĝi povas esti tre utila kiel unua klerigilo pri merkatekonomio.

Tre riĉas la rubriko "Esperanto-aplikado", kun esperantigita studo de D. A. Portman "Esperanto por kemiistoj", kontribuo pri uzado de amaskomunikiloj por esperanto kaj tre pensigaj artikoloj de M. Malovec, D. Harlow, G. Pirlot. La meditoj de la lastaj tri aŭtoroj estas konendaj por ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri la movada teorio, eks-termovada agado kaj efikaj manieroj propagandi kaj apliki la lingvon.

En la mallonga recenzo eĉ ne eblas mencii ĉiujn legindaĵojn de la numero, sed inter ne menciantaj materialoj estas pluraj kromaj interesaj artikoloj por sciencistoj.

N.G.

Abonkotiĝo ĉe libroservo de UEA por 4 numeroj en 1994: nur 22 NLG.

Adreso de la redakcio:

Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio en
la Ĉina Akademio de Sciencoj,
52 Sanlihe, CN-100864 Peking, Ĉinio.

Esperanton en doganon!

Esperanta Internacia Asocio de Deklaristoj en Dogano estis fondita en kadro de Matadia Esperanto-Centro. Celoj: traduki internaciajn dogandokumentojn esperanten; enirigi esperanton en internacian komercon. Kunlaborantoj kaj subtenantoj (unualoke el la Eŭropa Komunumo) estas bonvenaj.

Provizora sidejo:

B.P. 211, Matadi 1, Bas Zaire, Zairio.
el "Gazeto Andaluzia", sept./1993

Unikodo aŭ unikorno?

Unikorno estas mita ĉevaleto, kiun oni okaze vidas pentre sur blazonoj kaj iufoje kinene aŭ televide en animaĵoj kiel realisman artan produkton de la plej modernaj komputiloj. Ĉirkaŭ iom pli reala produkto el la komputista haladzejo, jen unikodo, volviĝas koncerne esperanton ne malpli da legendoj.

En preskaŭ ĉiu magazino oni entuziasme raportas, ke post la baldaŭa enkonduko de unikodo la esperantistoj nun fine ne plu havos problemojn komputile skribi siajn kuriozajn ĉapelitaĵojn kaj sian strangan literon Ŭo. Ne tiel estas! Unikodo estas nenio escepte de kodo. Kodo estas, simpligite, vico da numeroj, indikantaj signejoj por deponi signojn. Nu, ne ekzistas la leĝo, kiu postulas, ke ĉiu signejo de kodo estas ŝarĝenda per signo. Tial mi avertas ĉiujn entuziasmulojn, ke kiam unikodo aperos sur la merkato, la esperantaj signejoj estos verŝajne vakaj.

Tute freŝdate estas en Germanio la tekstoprilaborilo *Uni-Verse* surbaze de unikodo havebla. La alfabetoj kaj klavararanĝoj por preskaŭ ĉiuj lingvoj de amhara, araba, aramea, ĝis ukraina, urdua, vjetnama estas implementitaj. Por preskaŭ ĉiu alfabeto troviĝas tri aŭ kvar skaligeblaj (TTF) literotipoj kiel *Times Roman* kaj *Helvetica*. Memkompreneble la produktoproponanto financense taksante la atendotan debiton rilate al nia lingveto rezignis indiki niajn akcentliterojn.

Nun ne evoluante ĉiujn detalojn, mi asertas, ke unikodo praktike neniel ŝanĝos nian situacion. Preskaŭ ĉiuj komputilaj programoj havas la eblecon pere de klavo-kombinoj pene konstrui niajn supersignitajn literojn. Do, ora konsilo, prenu solidan plugĉevalon anstataŭ atendi unikornon.

Pejno Simono, Germanio
el "Monato", 10/1993

Rim: Abonantoj de *EVENTOJ* povas ricevi senpage 4 bazajn TTF esp-literotipojn al sia komputilo... (Vidu la nr-on 1/septembro-93!)

Speleologia vortaro


Esperantistoj ŝatas vojaĝi kaj ekskursi. Unu el la plej ekzotikaj specoj de tio estas vizitado de kavernoj. Sed la kavernoj kaj speleologia tekniko prezentas tiajn specialaĵojn, ke aperas problemoj pri vortoj por koncernaj nocioj. La Internacia Speleologia Fakgrupo ellaboris kaj eldonis malgrandan *Esperanto-14-lingvan speleologian bildvortaron*, kiu povas helpi la interkompreniĝon al diversnaciaj esperantistoj, ŝatantaj subteran romantikon.

La vortaro enhavas 83 esperantajn terminojn, tradukitajn al la lingvoj germana, ĉeĥa, angla, hispana, franca, itala, hungara, litova, portugala, rumana, rusa, sveda, slovakaj kaj slovena. Kompreni la terminojn helpas 3 informriĉaj ilustraĵoj.

La vortaro mendeblas ĉe ties redaktoro:
Péter Vukov, 48-as Ifjúság u. 36,
H-7400 Kaposvár, Hungario.

Konferenco en Ĉinio

La 4-a Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en esperanto, laŭ la ĉefa temo "Scienco, Tekniko kaj Nova Jarcento" kun komerc-negoca kunsido, okazos inter la 10-a kaj 17-a de julio en 1994.



Paralele okazos la Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj la 2-a internacia seminario "Survoje al ekologia etiko".

Partoprenkotiĝo (ne inkluzivanta loĝadon, manĝojn kaj ceterajn pagendajn aferojn): 200 USD; por esperantistoj el evoluantaj landoj: 50 USD.


Informoj ĉe:

Prof. Shen Chenru,
52 Sanlihe, CN-100864 Peking, Ĉinio;
Tel. +86-1-2561724; fakso: +86-1-8511095.

Komerca aplikado

1001 komercaj ofertoj!

1001 estas la titolo de semajna (!) komerca informilo, eldonata jam preskaŭ jaron de la firmao "Zónai kaj kompano". Ĝi aperas ĉiumarde en formato A/4, kaj aperigas plej diversajn ofertojn kaj serĉon pri diversaj varoj



en tre konciza formo. (Ekz. "Mi acetos 20 tunojn da kristalsukero, par. ukraina-hungara limo aŭ EXW, liverota al Moskvo." aŭ "Egipta firmao ofertas uzitan motoroleon, 2000 tunoj monate, el Saŭd-Arabio".) La ofertoj kaj serĉoj havas kodon, surbaze de kio oni povas peti pliajn informojn ĉe la firmao "Zónai". La anoncoj estas tute ne e-movadaj, estas pure komercaj!

La firmao havas esperantistajn (!) reprezentantojn en 23 landoj! Mem la inform-buleno "1001" aperas en modesta aspekto, nun en la lingvoj hungara kaj esperanta, preparatas la ĉinlingva, kaj ekde januaro aperos ankaŭ en angla-esperanta varianto.

Komercistoj, firmaoj, petu specimenon de "1001" kaj pliajn informojn ĉe:

Zónai kaj Komp.,
pk. 331. H-6501 Baja, Hungario.
Telefakso: +36-79-328048.

ĈU VI JAM
RESENDIS LA
ENKETILON?

(vidu nr-on 0042)

Lingvo

Kiel skribi la datojn per ciferoj?

En parola lingvo (*en esperanto*) oni unue indikas la tagon, poste la monaton kaj fine la jaron. En la *Fundamento* oni trovas: "Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua", kio egalas al: la 22-an de februaro 1932. Oni povas eĉ mallongigi kaj skribi: 22.02.1732.

En la lastaj jaroj, skribante la datojn per ciferoj, oni sufiĉe ofte indikas unue la jaron, poste la monaton kaj fine la tagon, tiel ke "La tria de februaro 1981" fariĝas "81.02.03" aŭ sen la nuloj. Tio povas kaŭzi konfuzojn. Se oni ellasas la jaron, kiel ofte oni faras, oni ne povas scii ĉu "02.03" estas la 3-a de februaro, aŭ la 2-a de marto.


Por eviti ĉian ajn konfuzon, plej bone estas sekvi ankaŭ tiurilate *Fundamenton*, la solan garantion de la lingva unueco, kaj indikadi per ciferoj unue la tagon, poste la monaton, kaj fine la jaron: 02.03.81 estas, do, la 2-a de marto 1981. La redakcio de *Horizonto* aplikas tiun principon kaj afable petas kunlaborantojn agi same.

Ivo Lapenna
el "Horizonto", n-ro 33 (3), majo-junio/1981

Revuoj, gazetoj

Sur la kultura vojo

Jen la gazeto, kiu relative senbrue, malgraŭ kutimaj por esperanto-gazetoj malfacilaĵoj, ĉiam pli firme starigas sur proprajn piedojn (aperis jam 15 numeroj) kaj, evidente, trovis sian originalan vojon. *Survoje* komencis de tre aŭdacaj teorioj kaj senbrida avangardismo, sed kun paso de tempo iĝis pli mo-



dera kaj bilanciĝinta - certe, signo de vera maturiĝo. Pli boniĝis ankaŭ la tipografia aspekto (la ĉefa riproĉo - tro malgrandaj literoj uzataj). Ne mirinde, ke al la gazeto nun ne hezitas sendi siajn kontribuojn William Auld, Georgo Kamaĉo, Blazio Vaha kaj aliaj korifeoj de la nuna e-kulturo. Do, *Survoje* nun rekomendindas ne nur por ŝatantoj de e-avangardismo, sed por ĉiuj, kiuj volas sekvi evoluon de nia kulturo en ties ĉiuj facetoj.

Abono de 6 numeroj kontraŭ 130 FRF ĉe "La Gazeto" (F-55210 Creuŝ, Francio; poŝtkonto 1025 02 Nancy).

La redakcia adreso:

Aleksandr Fjodorov (redaktoro), pk. 168,
UKR-335057 Sevastopol, Ukrainio.



Kara László!

...Mi devas reagi al via frazo: "Sed kie estas viaj ĝisnunaj lernantoj? Ĉu ili restas en la movado? Ĉu ili iel utiligas la lingvoscion?"

Viaj demandoj estas veraj. Miaj respondoj: Nenie estas miaj ĝisnunaj (ĉefe) lernantinoj. Ili estas post la abiturientiĝo senlaboraj aŭ vizitas ian kurson (anglan, komputilan, sanitaran). Kelkaj lernantinoj diris: ili povus utiligi Esperanton; ĝi helpas la anglan, latinan lingvolernadon. Por la movado ili ne havas tempon. Ili ne restas, ne estas en la "movado". Kial? Krom la manko de libertempo, ili ne havas monon. En nuna unu E-grupeto el dek lernantinoj la patro aŭ patrino de kvar lernantoj estas invalida, pensiul(in)o aŭ senlaborulo. Ĉe tiuj patroj aŭ patrinoj kiuj laboras, la monata salajro estas nete 8-10 mil forintoj!

Malgraŭ tio, la lernantinoj, kiuj komencis lerni E-on, dezirus vojaĝi al Kecskemét okaze de Zamenhofa memorfesto (en tiu urbo estas tre bone funkcianta instruado de E-o), al Graz, sed ili ne dezirus deklami, kanti kaj konstante lerni... Tiuj lernantinoj (dek) kolektis 500 forintojn por la Fondajo Esperanto en Budapeŝto. Mi petas Vin, ke tiun aferon bv. menciŭ en EVENTOJ!

Esperantistaj lernantinoj opinias, ke ili volonte vojaĝus, sed mankas la mono...

Tiuj estas miaj konkretaj reagoj pri viaj demandaj frazoj.

Alia temo: La gvidanto de Radio "Csaba", s-ro Gyula Major dezirus telefoni al vi, sed ne sukcesis pro nekonataj aparataj kialoj. Ni dezirus organizi telefonan ludon pri E-o, kaj petas vian helpon. Ĉu vi povus apogi, sponsori tiun ludon per kasedoj, libroj? Tiuj, kiuj bone respondos al la demandoj, estos premiitaj per libroj, kasedoj. La nomo de donacanto estos menciata. Laŭ mi tiu estas bona helpilo por la Internacia Lingvo...

...Vi skribis, diris: "Estonto de Esperanto dependas ankaŭ de Vi." Pro tio, mi anoncis kaj legis, legos novaĵojn esperante en la loka radio "Csaba" (91,8 MHz) de mezo de oktobro vendrede, sabate, dimanĉe kaj lunde. La informoj estas landaj (en-kaj eksterlandaj), urbaj kaj movadaj (el Eventoj), fine veterprognozo. Mi planis, ke miaj E-lernantoj legos, sed la novaĵoj ne estas registrataj, nur vivaj en la studio, tial mi mem legas, ĉar aliaj esperantistoj ne entreprenis la tradukadon kaj laŭtelegadon de la novaĵoj. La programo de Radio "Csaba" estas aŭdebla krom Békéscsaba en la najbaraj urboj (Gyula, Békés, Mezöberény, Kondoros). "La movadon faras la esperantistoj mem..."

dr. György Flender

Rim: Komente nur al unu parto de la letero: certe estas bonvenaj subtenoj ankaŭ de aliaj e-organizaĵoj, e-entreprenoj al la radia telefona konkurso. Kontaktdadreso:

dr. Georgo Flender, Ady E. Középiszkola,
Vasút u. 2, H-5720 Sarkad, Hungario.

Hungara angulo

Estrarkunsido de HEA

okazos 12.12.1993 je la 10.00 en sidejo de HEA (Andrássy ut 27). La tagordo:

- 1). Laborplano por 1994;
- 2). Buĝeto por 1994.

Kunsido de la Budapeŝta komitato

de HEA: 17.12.1993 je la 16.00 en Sütő u. 2.

Kultura kunveno

de Esperanta PEN-Centro - 19.12.1993 en Esperejo. Sin prezentos kantistino Anjo Amika.

Zamenhofa Tago en Budapeŝto

okazos 13.12.1993 je la 18.00. Pri la loko demandu telefone ĉe HEA (tel. 2680306).

Zamenhofa memorfesto

Nia E-Societo "Kecskemét kaj ĝia regiono" okazigos la feston la 12-an de decembro, je la 9-a horo en Kecskemét, Piarista Gimnázium. Dum la festo prezentos sin ankaŭ la popoldanc' kaj kantgrupo el Szank. Ĉiuj esperanto-parolantoj estas bonvenaj.

La movado en Kaposvár

Antaŭ kvar jaroj en Kaposvár funkciis 4 e-kluboj. Tiu ĉi "ora epoko" jam forpasis, kaj la lokaj esperantistoj ĝojas, se unu e-klubo estas trovebla en la urbo.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, ni kapoŝvaraj esperantistoj ne estos sen klubejo, kvankam ankaŭ ĝi estas granda-rezulto en nia monavida mondo, se iu kompatas nian malriĉan movadon kaj certigas ĉambreton por klubvesperoj. Ĝojinda informo, ke la urba kulturdomo sponsoras nin, kaj estas ebleco ĉiusemajne kunvenadi.

Pri preciza loko kaj tempo demandu telefone ĉe Péter Vukov: (82) 315508.

el "Vesperto" oktobro/1993

23-a VEF (Vintra Esperantista Fierio)

en Budapeŝto 30.12.1993-2.01.1994.

La aranĝo okazos en Kulturdomo Láng, Budapest XIII, Rozsnyai u. 3. La ĉefaj programeroj - la Internacia Silvestra Balo kaj prezento de Budapeŝto por la eksterlandanoj.

Aliĝo ĝis la 10.12.1993; oni povas aliĝi aŭ por tri tagoj, aŭ nur por la Silvestra balo. Petu informojn de

Movilo, 1157 Budapest, Hevesi Gyula út 107;
Tel.: 2719510



Lingvolernejoj

La mezlerneja revuo "Továbbtanulás", senpage distribuata en ĉiu mezlernejo en januaro aperigos liston de lingvolernejoj. Senpage oni povas registri ankaŭ E-kursojn. Skribu la nomon kaj kontaktdreson al: "Továbbtanulás, 1399 Budapest, pf. 701/1090.

Esperanto en radio

Kiel vi aŭdas? Respondu!

De la 1-a de oktobro ni dissendas plue je la sama horo, sed per iom ŝanĝitaj ondolongoj. Ni petis rimarkojn de la aŭskultantoj pri la funkciado de la ricevoj en la novaj frekvencoj (ondolongoj), kaj de multaj personoj ricevis tiajn informojn, do, tutkoran dankon al ĉiuj!

Sed montriĝis, ke ĉi tiu kvanto da raportoj estas por nia Teknika Fakto nesufiĉa kaj ni petas sendi similajn informojn pri la ricevebleco ĝis la fino de nuna jaro. La estro de tiu Teknika Fakto volas informiĝi laŭeble vaste, ĉu la unuopaj frekvencoj estas taŭgaj, kaj se ne, li pretas helpi niajn e-aŭskultantojn kaj eventuale liveri en estonteco aliajn frekvencojn. Do, por tio estas bezonataj laŭeble pli da raportoj.

Kompreneble, paralele bonvenas "Rimarkoj pri la programo", kaj diversaj proponoj pri la estontaj temoj.

Andrzej Petryn,

Pola Radio, Esperanto-Redakcio,
PL-00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Polio.



Konkurso

Stipendio Ivo Lapenna

Memore al prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la internacia lingvo ĝenerale kaj ties aplikado en scienco speciale, "Fondaĵo Ivo Lapenna" starigis *Stipendion Ivo Lapenna*.

La stipendio konsistas el subvencio al kiel eble plej multaj *disertacioj je universitata nivelo* (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L. L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

Ankaŭ en 1993 la stipendio estis aljuĝita por unu faklaboraĵo (100 svisaj frankoj): "*Lingue naturale e lingue artificiali: La sintassi dell'inglese e dell'Esperanto*" (Naturaj kaj artefaritaj lingvoj: sintakso de la angla lingvo kaj de esperanto), disertacio akceptita de la Universitato de Pavia (Italio); la aŭtoro: d-rino Paola Pruzzi.

Stipendio Ivo Lapenna refoje estos aljuĝita en 1994 por disertacioj *oficiale akceptitaj* de universitata instanco *en la jaro 1993*.

Aŭtoroj, dezirantaj kandidatiĝi al la stipendio, bv. peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto de "Fondaĵo Ivo Lapenna" (Torden Svendsen, Vanlose Allé 57, DK-2720 Vanlose, Danio). Por la transsendo de la faklaboraĵo en du ekzempleroj la limdato estas *fino de februaro 1994*. La adreso:

D-ro Klaus Perko,
Lenkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.

Historio

La radikoj de nia literaturo

(daŭrigo kaj fino. komenco en Eventoj n-ro 42)

Mi ne scias, ĉu li pravis, sed la demando denove estis saĝa. Tute klare, verko estas originala nur se ĝi estas "pensita" en esperanto. Nur kaj nur tiamaniere evidentiĝis iom post iom la fakto, ke esperanto estas lingvo kun propraj karakterizoj, lingvo tiel unika al si kiel la aliaj lingvoj. Ĝuste tio, apud ĝia socia rolo, estas la ĉefa valoro de la verkado originala: ekspluato de la lingvaj latentaj depende de rekta influo de aliaj lingvoj pro la tradukprocedo. Necesas fine ne nur pensado en la lingvo, sed eĉ pli spertado per la lingvo. Kun sola escepto de Zamenhof, tio ne ekzistis en 1887, ĝi devis iom post iom establiĝi dum la jaroj.

Al la artikolo de A.Z.-v la redaktoro de Lingvo Internacia, Paul de Lengyel, aldonis komentojn, interalie: "Jes oni pensas ordinare nur en sia patrolingvo - sendube ankaŭ s-ro Z.-v pensis sian artikolon ruse, kiel ankaŭ la redaktoro pensis tiujn ĉi rimarkojn hungare kaj li, tradukinte en sia spirito ĝin en esperanton, skribis rekte esperante". Ne mirinde, ke multaj samideanoj daŭre subtaksis en tiu epoko la valoron de originala verkado!

Pro tio kaj aliaj kialoj ŝajnas al mi, ke la vera naskiĝo de nia originala literaturo datigas de la jaro 1907, kiam aperis la 515-paĝa romano *Kastelo de Prelongo* de Henri Vallienne. Anonima recenziĝo en *La revuo* (1907, p. 205) salutis ĝin jene: "La originalaj verkoj en esperanta literaturo en la lasta tempo aperadis sufiĉe ofte, sed ĉiuj ili prezentis nur malgrandan provon en tiu ĉi direkto. Ni eĉ ne esperis, ke la granda originala verko tiel rapide aperos en nia literaturo".

Eĉ pli eksplicite estis la sama revuo, kiam aperis en 1908 la dua romano de Vallienne, *Ĉu li?*: "Oni povas havi diversajn vidpunktojn pri la neceseco en nia literaturo de originalaj verkoj, sed ŝajnas al mi, ke neniu, eĉ *principa kontraŭulo de esperantaj originalaĵoj*... [miaj kursivoj, W.A.] riproĉas d-ron Vallienne, ke li riĉigis nian literaturon per efektive bonaj romanoj... Laŭ mia profunda konvinko origina-

laj verkoj en esperanto estas ne nur permeablaj, sed eĉ tre dezirindaj. Nur originala verkado donas al la lingvo *la necesan sendependecon kaj elastecon de stilo* [miaj kursivoj, W.A.]".

La necesan sendependecon! Do esperanto estu ne nur pala imitaĵo, sed sendependa lingvo! Kaj tia ĝi fariĝis, iom post iom. Ŝajnas al mi, ke "principaj kontraŭuloj de esperantaj originalaĵoj" estas ĝuste samspecaj homoj, kiel tiuj, kiuj en la samaj jaroj kondukis nin al la ido-krizo (kiu liberigis nin, almenaŭ provizore, de la ludemuloj, por kiuj esperanto ne estis lingvo, sed "helpingvo").

Post 1907 nia originala literaturo ekkreskis atentinde. Komencis aperi maldikaj poemaroj - de Frenkel, Schulhof, Hankel, Karolczyk, Braun, Kozłowski, kaj fine Privat - du romanoj de Luyken, kaj plu jaraj novelaroj, ĉio en daŭro de sep jaroj, antaŭ ol la unua mondmilito renversis kaj funde ŝanĝis la mondon.

Tuj post la milito aperis la unuaj talentuloj, kies verkoj vere atestas, ke ili ne nur pensis, sed ankaŭ spertis, en esperanto. La poemoj kaj la du romanoj (*Viktimoj* kaj *Sur sanga tero*) de Baghy, kiuj estis inspiritaj de dumilitaj travivaĵoj en Siberio, klare sentigas siajn radikojn en la esperanta lingvo. Amo al esperanto, kaj ĝia uzebleco inter multnaciaj militkaptitoj, iĝis la ĉefa apogilo por Baghy kaj aliaj en la mizeraĵoj de la milita vivo. Ĝi atestis, ke *eblas pli bona mondo*, kiun ili volis krei post forpaso de la kataklismo.

Sur alia nivelo, ĉu necesas argumenti por pravi, ke Raymond Schwartz kreis siajn geniajn vortludojn ne "pensante en patrolingvo... kaj tradukinte en sia spirito en esperanton"? Tio estas evidente neebla. Tiuj spritaĵoj levigis nature el la lingvo esperanto kaj travivaĵoj en ties movado, do kulturo.

La poezio de Mihalski, kiu esploras la tentadojn de la lingvo, ne povus kreiĝi se necesus perado de lia nacia lingvo.

Oni povus multoblige tiajn ekzemplojn. Komenciĝis la epoko de esperanto kiel vere vivanta lingvo, kaj ne plu kiel "help-lingvo" malsupera al la aliaj, "realaj" lingvoj. Hodiaŭ nia originala literaturo formas solidan kaj ĝenerale rekonatan bazon de mondvesta diaspora kulturo.

William Auld
el "*La Brita Esperantisto*", sept.-okt. 1993

Anoncetoj

Ofertas informleteron pri lokaj kaj specialaj valutsistemoj kontraŭ IRK-oj. Sukcesaj sistemoj en anglalingvaj landoj! Bv. kontakti:

LIDS-o, Leterfako 1731,
Kitchener ON, Kanadio N2G 4R3.

Mi serĉas seriozan filatel-ŝanĝulon de neuzitaj p.m. (hungara jarkolekto kontraŭ pola jarkolekto el la jaroj 1985-1993).

Piotr Smigiel,
ul. Bronikowskiego 3 m. 2,
PL-85426 Bydgoszcz, Polio.

Serĉas por kolekto, interŝanĝe aŭ repaĝe, glumarkojn de Universalaj Kongresoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 8, 9, 10, 11, 12, 14, 15, 17, 18, 19, 23, 25, 28, 32, 33, 34, 35, 36, 38, 39, 72, 76 kaj 77.

Mario Canevari, via Degli Ortaggi 42,
I-00157 Roma RM, Italio.

Mi serĉas e-instruistojn, kiuj pretas sendi kaj ricevi simplajn verkaĵojn pri la ĉiutaga vivo, faritajn de lernantoj aŭ rekte en e-o, aŭ tradukitajn de la instruisto.

P. J. van Tol, Haanstraat 34,
NL-1531 Et Wormer, Nederlando.

Kulturo


Por ĉiu, kiu serĉas informojn pri asocio aŭ instituto en nia urbo, ekzistas valora libreto, senpage disdonita, kaj eldonita kun la helpo de la urbestro. La titolo: "Kiu, Kio, Kie en nia Urbo". Kompreneble ankaŭ nia esperanto-klubo aperas en ĝi.

Pri tio mi ricevis gravan plendon. La libro estas dividita en ĉapitroj, kaj pro tio nia klubo devis aperi en la rubriko pri "Hobiaj asocioj". En kelkaj similaj libretoj ankaŭ ekzistas ĉapitroj pri "Kulturaj asocioj", kaj oni atentigis min, ke nia klubo nepre estu en tiu ĉapitro.

Oni povas demandi sin: kio estas kulturo? Mi ne kuraĝas doni la respondon, ĉar ekzistas multaj opinioj pri tio. Tamen al kulturo nepre apartenas intereso pri literaturo, teatraĵoj kaj aliaj specoj de arto.

Nu, literaturo ĉe ni certe ne mankas. Per nia lingvo regule aperas verkoj, ofte tradukoj de la ĉefaj verkoj, kiuj iam aperis en ia nacia lingvo.

Tamen, bonvolu informi ĉe niaj libroservoj, kiom da ili ĉiujare estas vendataj. Pli simple: kontrolu vian libroŝrankon, kaj nombru la ĉefverkojn de la internacia skriba kulturo, kiuj tie troviĝas. Diru, se vi kuraĝas, kiom da tiaj verkoj vi legis dum la pasinta jaro. Kaj, se vi volas esti ĝentila, mi konsilas al vi: nepre ne faru enketon pri tio inter la membroj de via klubo, por ne embarasigi ilin.



Por esti vera kultura movado, ni nepre devus pli bone uzi la eblecojn, kiuj ekzistas en la literatura kampo. Kvankam oni ne povas nei, ke ankaŭ niaj libroservoj parte culpas pri la stagnanta vendado, ĉar bona vendo-politiko ofte mankas.

En la pasinteco vivis la tradicio aĉeti esperanto-libron okaze de la Zamenhofa festo en decembro. Estus bona ideo revivigi tiun tradicion por spirite riĉiĝi kaj por subteni nian movadon.

Ko Nurmi
el "Fenomeno", decembro 1991

EVENTOJ, Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.
A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti az MPV-HPI.
Készült a SZELKER Bt. nyomdában:
H-1161 Budapest, Baross u. 114.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas LINGVO-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.
Reproso de artikoloj estas permesita, kun indiko de la fonto.

Bazaj informoj

Esperanto kaj ŝako

La okupado pri ŝako inter esperantistoj estas preskaŭ tiom aĝa, kiom la lingvo mem. La probable unua ŝak-problemo en esperanta publikaĵo estas la "Problemo de ŝako" de Aurelio Abela, trovebla en la tria jarkolekto de "La Esperantisto" de januaro 1892, p. 16. Tra la tuta jaro 1892 aperas ĉiun monaton ŝaka problemoj ĝis la februara numero de 1893, kie la serio kun "Problemo 14" estas finita, la malmulta spaco en "La Esperantisto" iĝis uzata por aliaj celoj. Estis Zamenhof mem, kiu tiutempe redaktis la "Gazeton de la lingvo internacia Esperanto" kaj kiu enigis ilin.

Poste ŝak-rubrikoj estas troveblaj ekzemple en "German-Aŭstria Esperantisto" 1910, sub la gvido de S. Steiner kaj en la dudekaj jaroj en "Heroldo de Esperanto", "Sennaciulo" kaj eĉ en "Esperanto", la oficiala organo de UEA (de 1921 ĝis 1927 sub redakto de Fr. Hajek el Prago). La angulo reproduktis ne nur la kutiman materialon, sed - kiel juĝas *Enciklopedio de Esperanto* - "alportis ankaŭ sufiĉe da originalaj problemoj de alta arta valoro". Laŭ la sama fonto partoprenis en ĝi 170 samideanoj el 35 landoj.

Ŝak-anguloj estas same spureblaj en la esperanto-gazetaro post la milito 1939-45. Ni citu nur la rubrikon "ŝako" kun leksikoneto en "Hungara Vivo", startinta en numero 4/1976, p. 31 sub gvido de Jozefo Németh, la rubrikojn en "Esperanto", "Nuntempa Bulgario" kaj "El Popola Ĉinio".

Al la frua intereso pri ŝako inter esperantistoj korespondas la organiza situacio. "Societo de Esperantistaj Ŝakistoj" ekzistis jam en 1907. La nuna "Esperanto-Ŝak-Ligo Internacia" (EŝLI) estas fondita en 1958. Ĝi celas grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj scias esperanton, kaj varbi por la internacia lingvo inter ŝakistoj en la tuta mondo.

La unua prezidanto fariĝis Torston Lindberg el Svedio, sekretario Václav Faigi el Ĉeĥoslovakio. La plej grandan disvastiĝon atin-

gis EŝLI en la 70-aj jaroj, kiam ĝi havis en la adresaro ĉirkaŭ 700 adresojn de amikoj el 42 landoj.

La ĉefa agadcentro konsistas el organizado de korespondaj turniroj de diversaj tipoj. La baza estas tiel nomita "Monda Pokalo", ekde la plej malalta 3-a klaso ĝis la finalo, kies venkinto fariĝas "Ĉampiono de EŝLI". Regule estas startigata turniro de 4-membraj teamoj de unuopaj landoj - "Teamturniro". Ĉi-junie komenciĝis jam la 7-a jaro. Multajn jarojn jam estas konstanta parto de la agado la "Keres-memorturniro", organizita de geamikoj el Estonio (A. Reede) omaĝe al ilia plej granda ŝakisto. Okaze de diversaj datrevenoj estas startigataj jarturniroj, amikaj maĉoj



inter landoj ktp.

Se la koresponda ŝako estas la gvida linio de EŝLI, la personaj renkontiĝoj estas spicaĵo de la agado. Jam 17-foje okazis renkontiĝoj okaze de la tiel nomata "Internacia Esperanta Ŝakfestivalo" - turniro de unuopuloj el la klasika praktika ŝako, dum kiuj okazas pluraj societaj aranĝoj, vesperoj, renkontiĝoj, ekskursoj. Ĉiuj IEŜF-oj ĝis nun okazis en tiel nomataj "Orientaj landoj", en kiuj estas la plej granda nombro de EŝLI-anoj kaj en kiuj estis ĝis nun la plej malmultekosta restado. Volontulan organizanton el la "okcidento" ni nur atendas. La partoprenantnombro en IEŜF diversas inter 30 kaj 50 personoj. La 18-a Festivalo kaj samtempe la "1-a Mondĉampionato de EŝLI" okazis en 1993 en la rumana urbo Tulcea. La plej granda renkontiĝo kun ĝis 100 partoprenantoj estas la "Verda Olimpiko", la turniro de kvarmembra teamoj, okazanta unufoje en kvar jaroj. La lastan fojon ĝi okazis en 1991 en la ĉeĥa urbo Pobebrady.

La nevidebla parto de EŝLI-agado estas eldonado de la trimonata gazeto "Esperanta Ŝako". Ĝin lanĉis d-ro Jean Duthilleul el Francio. Longan tempon ĝi estis aperigata en Nederlando, kaj ekde 1991 aperas en Ĉeĥio.

La tutjara membrokosto estas 10 USD, kiu inkluzivas membrecon en EŝLI, eblon ludi en laŭplaĉa kvanto da turniroj laŭ propraj kapabloj kaj kvar numeroj de "Esperanta Ŝako".

Jaromír Caribál, Bernhard Fabet

INTERNACIA KONKURSO POR MEZLERNEJANOJ

4-A TASKFOLIO

1. Trovu almenaŭ kvar vortojn, kiuj konsistas el nuraj afiks(oid)oj, kiel, ekzemple, *alĝilo* (2 poentoj)
2. (*Diri laŭvorte*) sen helpo de teksto, libro. Esprimu per unu vorto! (2 poentoj)
3. Skribu per literoj la sekvajn matematikajn operaciojn: $3+3=6$; $10-3=7$; $2 \times 3=6$; $6:2=3$ (4 poentoj)
4. Ĉu *da* aŭ *de*? *duono ... torto / dek linioj ... teksto / plena ... akvo* (3 poentoj)
5. Kiel oni diras per unu vorto: *viro, kiu leĝas / tiuj, kiujn oni kaptis?* (3 poentoj)
6. Kion oni diras, akceptante kara(j)n gastoj(n)? (2 poentoj)
7. *Ju pli oni forprenas, des pli granda ĝi fariĝas. Kio estas tio?* (2 poentoj)
8. Rigardu la bildon. Ĝi konfuzas la nomojn! Rearanĝu ilin! (3 poentoj)
La solvojn sendu ĝis la 10-a de januaro 1994 al:
Bányai Júlia Gimnázium, Esperanto-grupo, Nytrí út 11, H-6000 Kecskemét, Hungario.

